

# EKO 2021

## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok  
jaroj, de post 2013  
2020: rekorda jaro:  
kun 60 komunikoj  
Subtene al la loka,  
landa, faka kaj  
regiona agado

EKO 2021-43 sendita el Budapeŝto la 6an de oktobro.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## Premio La Torre anoncita de ILEI

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kunlabore kun la familio La Torre anoncas konkurson pri esplorlaboro en unu el la kampoj, en kiuj laboris la karmemora prezidanto de ILEI, profesoro Mauro La Torre (1946-2010). En 2011 la Komitato de ILEI elektis profesoron Mauro La Torre honora membro de ILEI.

La esplor-kampoj estas:

- Aplikoj de lingvoteknologio al Esperanto kun rezultaj vortaroj aŭ pli ĝeneralaj lingvosciencaj pritraktoj
- Interkultura edukado per Esperanto
- Instruado de Esperanto kaj iloj por instrui Esperanton
- Perfektigaj kursoj por instruantoj de Esperanto
- Retaj kursoj pri Esperanto
- Evoluo de la vortrezoro de Esperanto tratempe kaj nuntempe

La kandidatoj anoncu sian intencon partopreni kaj sian temon ĝis la **1a de januaro 2022**. La ILEI-estraro kaj la familio La Torre tiam starigos juĝ-komisionon en rilato kun la temo de la esplor-laboro, kiu devas esti dokumentita kaj priskribita en raporto de almenaŭ 20 A4-paĝoj, maksimume 30 paĝoj. Kandidatoj transdonu siajn laboraĵojn rete al [ilei.prezidanto@gmail.com](mailto:ilei.prezidanto@gmail.com) ĝis la **30a de aprilo 2022**; la prezidanto transdonos ilin al la familio La Torre, al ILEI kaj al la ĵurio.

Servo subtenata de  
Universala  
Esperanto-Asocio  
kaj Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj



Helpantoj:  
Rob Moerbeek  
Gbeglo Koffi  
Francois  
Lo Jacomo

- ENHAVO**
- Premio La Torre en ILEI
  - Forumo en ILEI
  - Krakovaj kursoj
  - Itala kurso kaj afiŝo
  - Nuklea limigo

La anonco pri la gajninto okazos antaŭ la 30a de junio 2022. La gajninto devos sendi naŭ paperajn ekzemplerojn de sia laboraĵo, tio estas al familio La Torre kaj po unu, al diversaj gravaj Eo-bibliotekoj en la mondo laŭ la programo de ILEI "Ni Savu Niajn Semojn".



Foto: Familio La Torre en dana parko en Klampenborg, en la somero de 2003, kadre de la kongreso de ILEI en Öresund, Svedio.

Foto: SMG

La premio konsistas el sumo de 500 eŭroj. ILEI retenas al si la rajton eventuale aperigi la gajnintan raporton. La konkurso La Torre okazis jam du fojojn, en 2015 kaj en 2018. La trian fojon, la premio kaj la diplomo estos transdonataj en la jaro 2022 okaze de la 55a ILEI-Kongreso en Kebekurbo kaj pli vaste prezentata en la 107a Universala Kongreso de UEA en

Montrealo.

Ahmad Reza Mamduhi, prezidanto de ILEI

## La sepa ILEI-Forumo

Vendredon, la 8-an de oktobro 2021, de la 15:00 ĝis la 16:00 UTC

Ĉiuj estas bonvenaj al: ĉi tiu ILEI-Forumo, kies temo estas:  
**"Aktualaj spertoj el instruado de Esperanto en lernejoj"**

Se vi havas tia(j)n sperto(j)n vi povos kundividi, se ne, vi povas komenti kaj/aŭ pridemandi alies spertojn.

Jen alir-informo al la Forumo (en Zoom):

<https://us02web.zoom.us/j/82905766250>

Se demandite: Kunven-Identigilo (Meeting ID): 829 0576 6250

Pasvorto (Passcode): La nomo de nia komuna lingvo per minuskloj

## Nova kurs-oferto venas el pola universitato

Eble plezurigus vin regula renkontiĝado kun afablaj kaj interesaj gesamideanoj dum lernado de Esperanto. La fama Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando, nun proponas al esperantistoj de la tuta mondo du diversajn kursojn.

### **kurso 1**

#### **Evoluigado de la skribo- kaj parolkapablo**

Niaj kursgrupoj estas malgrandaj (ĉ.7-personaj), do individua aliro al la bezonoj de ĉiu el la studentoj estas ebla. Ekzemple, la kursano povas elekti pli multe ekzerciĝi pri skribado ol pri parolado aŭ inverse, aŭ nur skribi.

Ĉar tiutipajn kursojn preskaŭ ĉiam partoprenas ankaŭ Esperanto-instruistoj aŭ instruontoj, estos i.a. menciataj lingvoinstruaj postuloj, laŭ la nuna metodiko (laŭ la Konsilio de Eŭropo, kun la KER-principoj). Tiajn sciojn Eo-instruistoj ofte ne havas.

## kurso 2

### Kurso por verkemuloj

Triafoja okazigo de la sukcesa kurso el la du pasintaj jaroj. Lernado por kreantoj de diversaj tekstoj: verkistoj, ĵurnalistoj, aŭtoroj de blogoj, esperantistoj, kiuj emas skribi belajn leterojn k.a. personoj. La skribaj aktivaĵoj ampleksos leksikon, gramatikon, donos specialan atenton al sintakso kaj zorgado pri stilo. La programo respektos la individuan stilon de la partoprenantoj, okazos laboro pri ties disvolvado, krome, lernado per la stilo de modelaj verkintoj de la Esperanto-literaturo.

La 6-monataj kursoj (ili komenciĝos fine de oktobro aŭ en novembro 2021). Lecionoj okazados 1-foje semajne. La **oficialaj konfirmiloj** pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, ankaŭ la markon de la prestiĝa, internacia EAQUALS-kvalito de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

**Limdato por aliĝi: 9 oktobro 2021** (eblas ankaŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj).

**Pli da informoj** pri la kursoj: <https://bit.ly/37MIYye> (aŭ <https://docs.google.com/document/d/1JvimMeNI-nc3VJhi44f6NjzbzDuaZvepiVRI0BYdEW5c/preview>)

Se, studinte ĉiujn informojn en la ĉi-supre indikita retpaĝo, vi decidis **ALIĜI**, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl) <ĉe>[gmail.com](mailto:gmail.com)>

Maria Majerczak, Gvidantino de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato

## Retaj kursoj el Eŭropo evoluis

De iom da tempo la eŭropa komisiono de UEA disanoncas pri la bezono de retaj kursoj por reunigi la tro maljunan eŭropan movadon. Nun la aktiva itala landa asocio lanĉis tian kurson. Ĝi estas landnivele kunordigata kaj realigata de pluraj instruistoj. kiuj kovras ĉiujn tagojn de la semajno, ĝi estas senpaga por la kursanoj kaj ĝi celas gvidi la lernantojn al la movado, ĉar en la grandaj retaj kursoj sen instruisto ligoj al la movado kaj informoj pri ĝi ne ekzistas aŭ estas nesufiĉaj. Aliaj eŭropaj landaj asocioj dezirantaj fari la samon, bonvolu kontakti la eŭropan komisionon de UEA

**FEI**  
Federazione Esperantista Italiana

**ISTITUTO ITALIANO DI ESPERANTO**

**esperanto**

lingua internazionale parlata in tutto il mondo

logica di veloce apprendimento equa

**Corso online gratuito**  
15 lezioni di 90 minuti  
Sufficienti per una comunicazione di base

Inizio corsi NOVEMBRE

Per informazioni e orari scrivere a:  
**corsi@esperanto.it**

Una lezione a settimana, orario e giorni da concordare con il centro unico iscrizioni. Insegnanti su tutto il territorio nazionale

## Nukleaj armiloj

Vidu kaj auskultu la rakonton de s-ino Oŝoka Taeko, kiu sola kolektis 110 000 subskribojn kontraŭ nukleaj armiloj. Kelkajn jarojn ŝi staradis antaŭ la atombombita kupolo en la centro de Hiroŝimo, Japanio. Ni lernu de ŝia kuraĝa agado kaj ni mem laboru por la sennuklearnila mondo.

Bonvolu disvastigi la filmon.

<https://www.youtube.com/watch?v=YnjegL-DAjs-->

Jasuo Hori [horizonto@r.water.sannet.ne.jp](mailto:horizonto@r.water.sannet.ne.jp)

## Israela kongreso kaj pliaj kunsidoj

**7-9.10** - La 21-a **Israela Kongreso** de E-o (fizike) en gastejo Bnei Dan, Tel Avivo

(detaloj: <http://esperanto.org.il/ik.html>)

**11.10** - 18:30-20:00 fizika kunveno en **la tradicia sidejo WIZO**; **programo**: spertoj kaj bildoj de la Israela Kongreso. Poste: ELI-estrarkunsido,

**18.10** - **18:00**-20:00 fizika kunveno en **Alon** (la nova sidejo); **programo**: spertoj kaj bildoj de mia vizito en la Internacia E-Muzeo en Vieno kaj vojaĝo tra Aŭstrio.

**25.10** - 18:30-20:00 fizika kunveno en WIZO. **Programo: viaj proponoj bonvenas.**

## Filmado en Afriko

Raportoj pri Esperanto-aktivaĵoj en Afriko pli kaj pli priskribas agadojn rilate al infanoj, sed oni apenaŭ povis vidi tiujn infanojn esprimi sin en la zamenhofa lingvo. Mi ŝatus atentigi vin, ke kiel anoncote en ĝiaj planoj, la Afrika Komisiono de UEA daŭre donas subtenon por kreo de Esperanto-filmoj. Gilbert Niyukuri, vickunordiganto de la komisiono, kiu daŭre ĝuas ankaŭ bonan laborrilaton kun siaj kolegoj, ĵus produktis ĉ. 4-minutan filmon en kiu oni vidas infanojn flue paroli Esperanton. Bv. mem spekti kaj ŝati la filmon per <https://www.youtube.com/watch?v=JYwodaBmlnk>

Afrika Komisiono intencas pliigi film-agadojn, por kiuj, tamen, financa subteno de vi kaj de viaj organizaĵoj restas nepra al la konto Afriko ĉe UEA

Adjévi Adjé

===== vortoj: 1050 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.  
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de majo 2021 (per EKO 2021-22). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de post 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klintonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.